Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-55 en Panevėžys, Litovio

# Abelo



Merkredo, la 10-a de julio 2019

*N-ro 5*

## Kial “Abelo?”

Multaj BET-anoj demandas min: Kial vi nomis nian BET-gazeton “Abelo”? Kvankam ni jam aperigis la respondon en “Libro por BET-ano”, kiun ricevis en la kongresa sako ĉiu BET-ano, mi reaperigas la artikolon de Petras Čeliauskas (rimarko de la redaktoro):




Ni ĉiuj konas la laboreman insekton, abelon, kiu por homoj kolektas dolĉan mielon. Sed niaj gastoj povas ne scii, ke en Litovio la abelo estas tre estimata insekto.

En la litova folkloro ekzistas centoj da proverboj pri abeloj kaj ilia laboremo. En la litova lingvo la vorto *mirti* (= morti) estas uzata nur parolante pri homoj kaj abeloj; por aliaj vivaj estaĵoj ekzistas aliaj vortoj kun malestima nuanco ***mortaĉi***.

Ankoraŭ indas diri, ke la litova vorto *bičiulis* (= bona amiko) devenas de *bitė* (= abelo). En pasinteco la vorto *bičiulis* signifis fidindan homon, kun kiu oni prizorgis komunajn abelsvarmojn; hodiaŭ *bičiulis* – simple bona, proksima amiko.

Por informilo de Paneveĵa BET ni elektis la nomon *Abelo* ankoraŭ pro unu kialo. Ĉi tie loĝis la fama verkistino Gabrielė Petkevičaitė (1861-1943), konata laŭ la pseŭdonimo **Bitė** (= Abelo). Ŝi agis por virinaj rajtoj, en 1922 estis elektita al Fonda Sejmo (litova parlamento).





En Paneveĵo funkcias ŝia memor-muzeo (sur la bildo) kaj ŝian nomon havas ankaŭ la ĉefa distrikta biblioteko.

Ankaŭ ni agu ***a-b-e-l-e*** dum BET-55!

## Programo

### La 11-an de julio (ĵaŭdo)

| | |
|---|---|
| **7.00–8.00:** | Matenmanĝo – la unua alterno. |
| **8.00–9.00:** | Matenmanĝo – la dua alterno. |
| **10.00–11.00** | Prelego de prof. Aloyzas Gudavičius pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (ĉambro 117). |
| **10.00–11.00** | Prelego de Anna Striganova “Fabeloj de nescienca vidpunkto aŭ fabeloj por romantikuloj. Ĉu heroo malvenkas?” (ĉambro 204). |
| **10.00–11.00** | Prelego de d-ro Gábor Márkus “La spertoj de mia indramang-metoda lingvoinstruado” (ĉambro 118). |
| **10.00–11.00** | Prelego de Alfred Heiligenbrunner “Historio de Pi” (ĉambro 124). |
| **10.00–12.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (ĉambroj 303-311). |
| **11.00–12.00** | Prelego de prof. Ilona Koutny “Ĉu facila lingvo facile lerneblas?” (ĉambro 117). |
| **11.00–12.00** | Prelego de d-ro Manfred Westermayer “Plastaĵoj en la diversaj akvosferoj” (ĉambro 124). |
| **11.00–12.00** | Prelegserio de prof. Walter Żelazny pri religioj: la kvara prelego (ĉambro 118). |
| **11.00–12.00** | TEĴA: kunveno de ĵurnalistoj (por ĉiuj). Gvidas Alfred Schubert (ĉambro 205). |
| **11.00–12.00** | Kvizo “Kio? Kie? Kiam”. Gvidas Damir Kurbangaleev (ĉambro 204). |
| **12.30–13.30** | Tagmanĝo – la unua alterno. |
| **13.30–14.30** | Tagmanĝo – la dua alterno. |
| **15.00–16.00** | Prelego de d-ro Orlando Raola “Kemio kaj mediprotektado en la terkrusto” (ĉambro 118). |
| **15.00–16.00** | Prelego de Anna Striganova “Harry Harrison. Unu el la plej romantikaj kialoj lerni Esperanton” (ĉambro 117). |
| **15.00–16.00** | Prelego de prof. Gong Xiaofeng “Konciza historio de Esperanto-movado en Ĉinio” (ĉambro 124). |

# Prelego de Anna Striganova

**Dimanĉe posttagmeze, kadre de la 36-a Studadserio de AIS, Anna Striganova prelegis pri „Fabela Antagonisto aŭ iom pri ŝato al malbonaj herooj“.**

Anna laboras ĉe filologia fakultato de Rusia Universitato de Amikeco de Popoloj (RUDN) kaj okupiĝas pri esploroj de literaturo, mitoj kaj fabeloj. Anna verkas ankaŭ beletron en la rusa kaj en Esperanto. Kelkaj ŝiaj libroj trafis furorlistojn de la Libroservo de UEA. Ekde aprilo 2017 ŝi estas kunredaktoro de la revuo Esperanto de UEA. Kune kun Dmitrij Ŝevĉenko ŝi gvidas universitatan kurson de Esperanto kaj kunlaboras en la eldonejo Impeto.

La nova libreto de Anna Striganova „Fabeloj de la neserioza heroo“ premieras dum BET. Vi povas akiri ĝin kaj ankaŭ la aliajn kvin libretojn el la serio „Fabelaj sekretoj“ en la libroservo de BET.


















**15.00–16.00** Aŭtora horo kun Mikaelo Bronŝtejn. (ĉambro 205)

**15.00–16.00** Aŭtora duonhoro kun Tatjana Auderskaja. (ĉambro 206)

**15.00–15.30** Spektakleto de la urba infanĝardeno “Puriena” laŭ la slovena popola fabelo “Paŝtisteto” (ĉefsalono).

**16.00–17.00** Prelego de prof. Aleksandr Melnikov “Kiel artefarita lingvo kvazaŭetnon kreis” (ĉambro 117).

**16.00–17.00** Prelego de Dima Ŝevĉenko “Modernaj sociaj retoj kaj Esperanto”: la unua parto (ĉambro 124).

**16.00–17.00** Prelegciklo de prof. Walter Żelazny pri sociologio de la Esperanto-movado: la tria prelego (ĉambro 118).

**16.00–17.00** Intelektaj ludoj kun Tatjana Auderskaja (ĉambro 206).

**16.00–17.00** Violonkoncerto de Fransoazo (ĉefa salono).

**17.30–18.30** Vespermanĝo – la unua alterno.

**18.30–19.30** Vespermanĝo – la dua alterno.

**20.00–21.00** Koncerto de Mikaelo Bronŝtejn (ĉefsalono).

# Manĝmenuo por BET-55

**La 5a tago, ĵaŭdo** (2019-07-11)

| | | |
|---|---|---|
| **Matenmanĝo** 7:00 – 9:00 | Kaĉo el kvinspeca grio | 200 g |
| | Bulketo kun papavsemoj | 80 g |
| | Kafo, teo | 200 g |
| **Tagmanĝo** 12:30 – 14:30 | Fazeola supo | 250 g |
| | Fritita fiŝo kun sezamaj semoj | 100 g |
| | Fritita kokaĵo | 100 g |
| | Terpoma kaĉo | 100 g |
| | Salato el freŝ-legomoj | 100 g |
| **Vespermanĝo** 17:30 -19:30 | Kaze-flanoj, kremo, konfitaĵo | 150g / 30 g |
| | Kotletetoj el kazeo kaj terpomoj kun krema saŭco | 200 g / 40 g |
| | Teo | 200 g |



# Prelegoj de Ilona Koutny

**Lunde antaŭtagmeze prof. Ilona Koutny prelegis pri „Mondo, vortprovizo kaj vortaro“.**

Prelegserio de Ilona Koutny kun la titolo „Lingvo kaj kulturo“ okazas enkadre de AIS. La 4-a prelego havos alian titolon, ol anoncita en la BET-Libro, nome: „Kiel Esperanto, lingvo el provtubo, iĝis natura lingvo. Ĝi traktos diferencojn inter planitaj kaj naturaj lingvoj, poste analizos la lokon de Esperanto inter naturaj lingvoj.



# Baza Literatura Krestomatio

**Lunde posttagmeze okazis en la BET-ejo, ĉambro 204, lanĉo de la nova libro de *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio.**

La lanĉon partoprenis Aleksander Korĵenkov, Halina Gorecka kaj Povilas Jegorovas.






# Koncerto de Kaŝi

**Sabate vespere okazis en la ĉefsalono de la universitata konstruaĵo koncerto de Kaŝi.**

Kaŝi estas la artista nomo de Carsten Schnathorst – blinda muzikisto, komponisto kaj kantisto el Hamburgo. En Panevėžys Kaŝi koncertis kun kanzonoj propraj kaj internacie konataj. Li eĉ dancigis la publikikon!



# Ekspozicio pri ZEOJ

**Ekspozicio pri Zamenhof/Esperanto-objektoj troviĝas sur la unua etaĝo en la universitata konstruaĵo, Nemuno str. 3.**

Ĝi troviĝas en la koridoro, maldekstre, apud la ĉambro 201. La ekspozicion preparis Robert Kamiński, ZEO-delegito de Universala Esperanto-Asocio.



## Novaj aliĝoj

408. Sigita Sičiūnienė, Litovio
409. Algis Kaspiravičius, Litovio
410. Rimas Šuopys, Litovio
411. Daina Untuk, Latvio
412. Inesa Balaikienė, Litovio
413. Lee Hyosung, Koreio
414. Jolanta Bulotė, Litovio
415. Jolita Ružauskienė, Litovio
416. Jurgita Narbutienė, Litovio
417.Nida Narbutaitė, Litovio
418. Milda Narbutaitė, Litovio
419. Raimonda Gžimailė, Litovio
420. Kazys Tamošėtis, Litovio
421. Vilija Kailiūtė, Litovio
422. Rasmina Uščiauskienė, Litovio
423. Augustas Kazlauskas, Litovio
424. Domas Gintautas, Litovio
425. Ina Butėnienė, Litovio

# Mirinda (en) BET-55





Oni vendas la trinkaĵon "Mirinda" en la vendomaŝino de la kafoangulo de la BET-ejo. 'Mirinda' estas konfirmita Esperanta markonomo. Eble tio menciindas en *Abelo*. Yves Nevelsteen. – Do jen kion skribas pri ĝi Vikipedio:

Mirinda estas marko de limonada refreŝiga trinkaĵo, origine kreita en Hispanio. La nomo devenas el Esperanto kaj estas asertoj, ke la originala posedanto estis individua esperantisto. Ĝi havas fruktodiversecojn, inkluzive de gustoj je oranĝo, vinbero, pomo, frago, frambo, ananaso, banano, granato, citrono, hibisko kaj grapfrukto. Krome gusto "citruso" ankaŭ haveblas en certaj areoj de la Proksima Oriento. Ĝi estas parto de trinkaĵareo ofte referita kiel la gustosegmento, inkluzivas karbonatatajn kaj ne-karbonatatajn frukt-aromigitajn trinkaĵojn. La oranĝa gusto de Mirinda reprezentas la plimulton tutmonde.

En 1970 la usona konzerno PepsiCo aĉetis la markon Mirinda kaj komercigas ĝin unuavice ekster Nordameriko. Ĝi konkuras kun la limonadaroj Fanta de la kompanio Koka-kolao kaj Orange Crush de la kompanio Dr Pepper Snapple, kaj kun gustomarkoj lokaj en individuaj landoj. Kiel aliaj refreŝigaj trinkaĵoj, Mirinda estas havebla en multoblaj formuliĝoj dependantaj de la gusto de individuaj merkatoj.

Ĝi estas grava marko en Ĉinio, Sud-Orienta Azio, Mezoriento kaj Sudameriko (kaj ankaŭ en Slovakio, rimarko de la redaktoro).




## Ĉu vi jam kontribuis al *Abelo*?

En *Abelo* vi trovas aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de la programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-55, fotojn k.s. La enhavo dependas ankaŭ de la kontribuoj de la BET-anoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj impresoj, programeroj, ideoj (eks)kursoj ktp, kaj poste aŭ metu la kontribuojn en tiucelan skatolon



☚ ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete al: *stano.marcek@gmail.com*. Ankaŭ kvalitaj fotoj estas bonvenaj, same kiel pri-BET-aj anekdotoj kaj rakontoj.

**Stano Marček, via redaktoro**